

PENSEO

N-ro 310

aŭg. / 2017

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 28-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Anteo (Ĉinujo)

magiistino

aromo el sub minijupo
hundeton ĉirkaŭturnas kiel fanon.
eklevas blovo la kovrilon;
ĝi vidas nur artefaritan ranon.

2014.03.27

granda dormemulo

juna, espartinte litotukon por mi,
en ĝi mi sub steloj tuj kuŝiĝis dormi.
pasis jam jardekoj; ŝtormoj min ruladis.
olda, mi ne ĉesas ronki kvazaŭ korni.

2014.03.27

peko de simioj

se simioj konus ja kanoni
siajn fratojn, ni ne amus sang-avidon
kiel plantoj; homoj timus ŝtoni
homojn ĉar simioj venĝus siajn idojn.

2014-03-28

realo

siblaj serpentoj svarmas sur la vojo.
min ĉasas hundogrego kun fibojo.
rifuĝas mi en inan necesejon;
tie gevirojn ravas seksoĝojo.

2014.05.20

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)

Protagonisto

Hodiaŭ mi submetiĝis al eĥkardiogramo, kaj ekpensis pri la mistero de l' vivo. Obeema, mia koro plenumas sian hejmtaskon dum preskaŭ sep jardekoj. Spite al ĉio.

Laika, tiam mi demandas: —Kio igas la koron bati?

Kaj feliĉa li tuj respondas: — La revo, kiun mi ĉiutage trinkas en la neesprimebla kaliko de l' Poezio.

Juiz de fora, 17/07/2017.

Paŭlo Silas (Brazilo)

POEMO KUN STRATA ESENCO

Mi verkis poemon dum mi piediris.
Kion? Vi diros kvazaŭ sen kompreni.
Jes. Mi verkis poemon surstrate, kun piedoj moviĝantaj.
Se mi disponus poŝtelefonon,
mi povus registri sonversion de mia poemo.
Sed mi ne havis poŝtelefonon.
En mia dorsosako, troviĝis papero kaj plumo.
Mano maldesktra: libro sur kiu apogiĝis la papero.
Mano dekstra: plumo, kun blua koloro.
Unu piedon antaŭen. Nun, la alian.

Unu plian vorton en la verso.
Ĉu vi konas la stratojn de la brazilaj suburboj?
Ne maloftas trovi truon sufiĉan por bovo.
Foje verki poemon estas danĝere.

la 5-an de majo 2017

KAMUFLADO

La litero C, je eniro en fora lando,
kaj por ke homoj ne pensu ke ĝi afektas,
kamuflis sian fremdecon per ĉapelo.
Kiu rekonus ĝin krom du aŭ tri homoj, ĉu ne?
Sed en tiu mondoparto la kutimo diktas,
ke ĉapelojn portu nur vokaloj.

la 5-an de majo 2017

Mori (Usono)

AFORISM-e (22)

Paradizo
ne estas ie
malantaŭ vivo-fino,
Paradizo estas;
brakoj de amat(ino).
***
Malantaŭ ĉiuj
ŝajne sanktaj bataloj
estas sekretaj,
malicaj kialoj.
***
Homo
libera de timo
ne plu estas viktimo.
***
Kanibalojn
ne plu serĉu en
ĝangaloj,
nun elegantaj
kanibaloj
sin amuzas en
danco-haloj.
***
Tio,
kion saĝulo
diras je la komenco
idioto komprenas
post longa
pripenso.
***
Blinda voĉdonado
en politiko
estas je l' servo de
politika malamiko.
***
La mondon
ruinigas
ne politikaj potenculoj,
sed multnombraj
indiferentaj senpensuloj.
***
Vivo
estas ludo kiel futbalo,
kuru, konkuru, venku
sen batalo.
***
Homo kiu konscias
pri siaj makuloj
ne serĉu makulojn
en la aliaj uloj.
***
Homo
lernis naĝi kiel fiŝo
en la maro
kaj flugi kiel birdo
en aero
sed ankoraŭ ne vivas kiel homo
sur la tero.
***
Pri alies makuloj
ne parolas saĝaj
maturuloj.
***
Stultaj politikistoj
en politiko,
pli danĝeras ol
armeo de malamiko.

***

Birdo scias ke libero
pli valoras ol pano
sed tion ne scias
inteligenta homarano.

***

Feliĉa estas homo
kies vivo
ĝis la tombo
estas pacoplena
kiel kolombo.

***

Ĉiu homo
prezentas sin
antaŭ popolo
per vestaĵo,
sinteno,
kaj parolo.

***

La plej bona
magneto
estas homa rideto.

***

Kie laborul’
vivas en mizer’
tie estas
surtera infer’.

***

Ruzaj gvidantoj
en politiko
dividas homojn
je amiko
kaj malamiko.

***

Homo povas batali
samkiel animalo
sed ne povas vivi
kiel homo kun moralo

***

Kredu
duonon de tio
kion vi vidas
kaj nenion de tio
kion vi aŭdas.

***

Inter ĉiuj animaloj
en la monda ĝangalo
homo estas
la plej sovaĝa animalo.

Cezar (Germanujo)

Printempo dormis sur herbej’,
konfide! Konfide!
La najtingaloj vekis ĝin,
jubilas hele kaj sen fin’.
En rojoj sonas laŭ muzik’
por nia kara koramik’,
rapide! Rapide!

Printempo iras tra la val’!
Konfide! Konfide!
Li vestis sin per bunta vest’
por danci en printempa fest’.
Li volas kun tulipoj danci
kaj en la balo plu bonŝanci,
rapide! Rapide!

Printempo frapas al la pord’,
konfide! Konfide!
La vintro ŝtelas sin nun for.
Jam venis lia lasta hor’.
Postrestis de ĝi nur la rust’.
Printempo premas nin al brust’,
rapide! Rapide!

Printempo kuras tra la dom’,
konfide! Konfide!
Ĝin sekvas tuj la sunobril’
kaj ventokirl’ kun laŭta tril’.

Ĝi kuras haste tra l’ ĝarden’,
gajecon semas jen sen pen’,
rapide, rapide.

Printempo iĝas mem infan’,
konfide! Konfide!
Infane kuras kiel vent’.
Ha, kia bela hela sent’.
Printemp’ tulipon fine trovas.
Mateno mem la fluton blovas,
rapide, rapide!

Printempo dancas tra la strat’,
konfide! Konfide!
Salutas dolĉe ĝin odor’
kaj laŭte batas ĉiu kor’.
Printempo estas juna vir’
kaj ĉiam venu laŭ dezir’,
rapide, rapide!

Wally Du Temple (Kanado)

Klimataj katastrofoj

Forglitos Urboj
Pri la urba fiziko de glaciglitoj,
Pro degelo forglitos Londono ŝajne
Mahattan, Mumbai, Pacifikaj insuloj kiu ajn
Ili forglitos maren post diskreviĝo de polusglaĉeroj
Kiam montsupraj glaĉeroj iĝas glaciriveroj
Pro aŭtoj, aviadiloj, industrioj, polucioj, avidaj homoj, kaj egooj
Forglitos glacio kaj loĝkvartaloj de Islando.
Degelos, kaj forglitos la glaciejoj de Groenlando
Ĝis avko inundas nazotruojn niajn,
Kiam digoj, kaj domfostoj ne pli utilos.
Teruloj sen tero naĝos kiel fiŝoj
Inter la rubaj flosaĵoj de dronantaj metropoloj.
Forglitos Ateno, Rangoon, Vankuvero
Ĉielskrapuloj pinte restos kiel hompostsignoj
Sen vivaj kaj kadukaj kiel la detruita regno de Ozymandias
Ĝis nenio plia restas kaj ĉirkaŭe
Nur la blua maro etendiĝas ĝis la horizonto.
Sube restos fabelaj rakontoj de iamo
Kiel imagoj pri Atlantiko subakviĝinta
Literaturo, arkitekturo, belarto, ĉu vere estis?
Ĉu io leviĝos denove kiel feto el la fekunda utero de la maro?

Paulo Nascentes (Brazilo)

Ekstaza rideto

Bona Espero. Frostmaten’.
Sundirekten marŝas mi
akvofalen ja promen’
al ĝarden’ de Poezi’

se malgravas la destino
tute gravas ĉi korplen’
marŝado mem jen la festo
koncentriĝo je la spir’
ĉar spir’ estas Ĉeesto:
en animon ĉi alir’

surprize subita alveno
jen mi kaj hundet’ amika
ekvido de l’ akvofal’
surŝtone sid’ medita
susuras likva kristal’
mateno plene benita

(ĉu ridetas ĉi hundeto?!)
mensfluge sed tie ĉi
poemon poste mi verku

pri l’ magio de Poezi’
— dia Ĉeesto estu ĝi!

Helena Tylipska (Italujo)

Unua kis'

Forgesiĝis unua kis’
surpriza, ŝtelita,
la tuŝo de la buŝoj
timema,
de du adoleskantoj.
Kvazaŭ preteflugo
de blanka papili’
Geniĝis li
Hontis mi
Restis pendanta inter ni
La kis’.

Takashi Ito (Japanujo)

jen, dek, naŭ, ok, sep ...

mola venteto
tra inter koridoro ...
jen hortensio

ho, hortensio! ...
vento antaŭ mil jaroj
fine vekas min

jen, dek, naŭ, ok, sep
orf-sovaĝ-anasidoj...
avo kalkulas

ĵus malaperis ...
la papiliono ĉe
soleca arbo

Ivanichka Madgharova (Bulgario)

Ekneĝis kaj jen –.
la floroj sen spiriĝas.
Vintra kisego.

❄

Bird’ voĉplenigas
sen stelan nokton. Vagul’
ĉe rubsitelo.

❄

La blankaj rozoj –
perloj en knabin kolĉen’.
Flustroj de nimfoj.

❄

Acidĉerizbranĉeto
en l’ hararo de filin’
Nupta vestaĵo.

Zhuangzi (369-286 a.K)

Zhuangzi

ĈAPITRO DEKUNUA

Lasu fari kaj toleru

§11-06

La homoj en la mondo ordinare ĝojas tiam, kiam aliaj konsentas kun ili, kaj malbonhumoras tiam, kiam aliaj malkonsentas kun ili. Ili amas tiujn, kiuj konsentas kun ili, kaj abomenas tiujn, kiuj malkonsentas kun ili, ĉar ili volas elstari inter siaj similaj. Kaj tamen tiuj, kiuj penas superbrili aliajn, ne nepre estas tiuj, kiuj vere superas ilin, ĉar tiuj, kiuj kontentas per tio, kion ili mem scias, estas ne nepre pli sagacaj kaj inĝeniaj, ol la aliaj. Tiuj, kiuj volus regi super la popolo en la mondo, estas tiuj, kiuj direktas siajn okulojn sur la avantaĝojn de la regado de la tri grandaj reĝoj en la dinastioj Xia, Shang kaj Zhou, sed neglektas la katastrofojn, kiujn ili alportis al la popolo.

Ili provas sian ŝancon je la kosto de la regno. Ekzistas preskaŭ neniu, kiu provus sian ŝancon sen perdi finfine la regnon! La ŝancoj por tiuj, kiuj konservas sian regnon, estas unu en dek mil, dum la ŝancoj por tiuj, kiuj perdas sian regnon, estas dek mil aŭ pli. Ve al tiuj, kiuj tenas la tronon sed tute ne scias pri tio!

Tiu, kiu posedas teritorion, tenas la regnon. Tiu, kiu tenas la regnon, ne devas esti influata de materialaj interesoj. Nur tiu, kiu tenas la regnon kaj ne estas influata de materialaj interesoj, povas regi la regnon. Tiu, kiu posedas la materialojn kaj ne estas posedata de ili, povas ne nur regi super la popolo en la mondo, sed ankaŭ iradi libere en ĉiuj direktoj kaj vagadi en ĉiuj regionoj de la regno. Tiu, kiu venas kaj iras tute sola, estas konsiderata kiel “unika”, kaj la “unika” homo estas konsiderata kiel la “plej nobla” en la mondo.

La plej noblulo donas siajn instruojn en la formo de ombro aŭ per la sono de eĥo. Li respondas per sia tuta saĝeco ĉiujn demandojn, kiujn metas al li la popolo en la mondo. Li ripozas en kvieteco kaj vojaĝas en sendirekta vasteco. Kune kun la tumulta homamaso, li vagadas en la lando de senfineco, kie ekzistas nenia obstaklo sur lia vojo, nek fino en siaj tagoj. Ne nur liaj paroloj, sed ankaŭ lia fizika formo, tute konformas al la potenca Taŭo, kiu malaperigas lian “memon” en sin. Tiu, kiu ne havas sian “memon”, neniel povas alkroĉiĝi al sia “ekzisto”. Tiuj, kiuj alkroĉiĝas al sia ekzisto, estas la nobluloj en la pasinteco, dum tiuj, kiuj forgesas sian memon, estas la amikoj de la ĉielo kaj la tero.

Tio, kio estas modesta sed utiligenda, estas la estaĵoj. Tio, kio estas humila sed obeenda, estas la popolo. Tio, kio estas sensignifa sed farenda, estas la aferoj. Tio, kio estas severa sed starigenda, estas la leĝoj. Tio, kio estas malproksima de la Taŭo sed observenda, estas la justeco. Tio, kio estas personfavora sed disvastigenda, estas la humaneco. Tio, kio estas moderigata sed plimultigenda, estas la ritoj. Tio, kio estas natura sed laŭdegenda, estas la virto. Tio, kio estas integra sed variigenda, estas la Taŭo. Tio, kio estas mistera sed sekvenda, estas la naturo.

Tial la saĝuloj sekvas la naturon kaj ne provas plibonigi ĝin. Ili perfektigas sian virton kaj ne fariĝas ĝia sklavo. Ili agas laŭ la Taŭo kaj faras neniajn anticipajn projektojn. Ili konformigas sin al la humaneco sed ne sin apogas sur ĝi. Ili strikte praktikas la justecon kaj ne penas ĝin akumuli. Ili observas la ritojn kaj ne ilin evitas. Ili plenumas aferojn kaj ne rifuzas ilin. Ili obeas la leĝojn kaj ne rompas ilin. Ili fidas la popolon kaj ne trouzas ĝin. Ili cedas al la denaska naturo de la estaĵoj kaj ne agas kontraŭ ĝi. Ili neniam truddevigas sin por fari ion, sed iafoje ili devas fari ion. Tiuj, kiuj ne komprenas la naturon, ne povas atingi la purecon de sia virto. Tiuj, kiuj ne komprenas la Taŭon, ĉie malsukcesas. Kompatindaj estas tiuj, kiuj ne komprenas la Taŭon!

Kio do estas la Taŭo? Ekzistas la Taŭo de la naturo kaj ekzistas la Taŭo de la homo. Ne agi kaj tamen imponi al ĉiuj estas la Taŭo de la ĉielo, dum agadi kaj esti ligita per siaj agoj estas la Taŭo de la homo. La reganto devas praktiki la Taŭon de la ĉielo kaj la regatoj devas praktiki la Taŭon de la homo. Grandega estas la diferenco inter la Taŭo de la ĉielo kaj la Taŭo de la homo. Ni devas bone kapti la diferencon inter la du.

Elĉinigis

Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)

Admono de Alaho

el la rakontoj pri Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Afanti,
ofte de malsat’
suferis pro malriĉec’.
foje sur la bazar-strat’
kriadis en laŭt’:

“Sendito
de Alaho mi
estas! Mi de Alaho!”
La reĝo jen sciis pri
tio kun envi’.

Venigis
li lin al palac’
kaj demandis: “Vi diras,
ke vi devenas de Alah’,
diru al mi, aĥ’

do, kion
Alah’ admonis?”
“Lia admon’ riĉigos,”
Afanti tion donis,
ŝajne friponis.

“Rakontos
mi al vi plue,
kiam mi ja satiĝos.
Jen alportu unue
manĝon senbrue.”

La reĝo
pensis pri la bon’
alportota de Alah’,
aranĝis jen per ordon’
manĝon en salon’.

Post manĝad’
Afanti diris:
“Alaho min admonis:
‘la reĝ’ de vi rab-ŝiris
monon kaj tiris

vin al marĉ’
de povra stat’.
Vi rajtas sate manĝi
ĉe l’ reĝo laŭ via ŝat’
kiel lia frat’!”

Sero (Ĉinujo)

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Kiel vent’
fulmas susure
ĝi — oni diras — preter
la vid’ ĉevalveture
foren senspure.

Tiktake
ĝi sonas klare —
oni diras — laŭritme,
jen kiel ondoj mare
batas plaŭd-fale.

Ĝi marŝas,
marŝas senlace —
oni diras — pasante
preter homoj donace
sensone pace.

Alternas
la sezonoj kvar
kaj pentras la hararon
de gehomoj sen erar’
grize en egal’.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Vejdo (Ĉinujo)

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo**

Ve!
Falas stel’ el l’ apoge’
ĉiela
de l’ verda ide’.

Stel’
verda super vasta step’
jen sinkas
ankoraŭ kun hel’.

Ni
memoru ja kun konsci’
meriton
lian de raci’.

Jen
nia verda entrepren’
rikoltos
fruktojn per festen’.

*Li Sen (1923-2017): fama esperantisto, eksprezidanto de Esperanto-Asocio de la Interna Mongolio, konstanta konsilanto de la Ĉina Esperanto-Ligo. Pro liaj meritoj en la ĉina E-Movado li akiris premion de dumviva atingo.

**Deskses-Silabo: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Klavdija Grebenŝĉik

Virkato Ĉarlik – Ĉingaĉguk Akra Ungego

Kaj ankaŭ kelkaj bildoj el usona vivo

Tiuj impertinentaj musoj jam tedis nin. Ili estis multega kvanto, kaj ili timis neniun. Ili aperis el ĉiuj anguloj de ĉambroj. Jen ĉi tie jen tie ili elŝovis sin el eta truo kaj ĉirkaŭrigardinte ĉambron kiel fulmo kuregis laŭ muro kaj malaperis sub divano aŭ enkuris en apudan truon. Ilia ŝatata loko estis kuirejo, en kuirejo ili sentis sin kiel mastroj. Ne atentante min ili impertinente trakuris kuirejon laŭ diagonalo post mia dorso, kiam mi starante apud forno kuiris ion.

Ni batalis kontraŭ tiu malfeliĉo kiel povis, kvankam por mi tio estis morale malfacile. Vi ridos, sed ili estas tre ĉarmaj uloj, tiuj musoj. Kial Wald Disney[1] uzis muson kiel heroon? Ja li povis uzi ajnan animalon. Sed ne. Ĝuste tiu malgranda animalo konkeris koron kaj animon de Wald Disney, kaj li kreis muson Micky Mouse, kiu en sia vico konkeris tutan mondon kaj iĝis senmorta. Jen kaj min en infanaĝo musoj ĉarmis. Ili estas tiaj ĉarmaj kun akuta vizaĝeto kaj brilaj bidoj de okuloj. Foje mi kaptis muson. Kiel tio okazis, mi nun ne memoras. Mi karese, por hazarde ne sufoki, tenis ĝin en mano kaj atente rigardis ĉarman vizaĝon. Sed tuj mia avino venis kaj kun krio “Tiu infano konstante prenas je mano ĉian infekton!” forprenis je mi muson kaj ĵetis ĝin al sitelo por malpuraĵoj. Mi ploris dum tuta tago, tiel mi kompatis tiun muson. Oj, pardonu min, mi distriĝis de ĉefa rakonto. Mi revenas.

Kaj jen, imagu, mi devos militi kaj detrui multegan kvanton de musoj!

Mia edzo Aleksandro ĵetis sin al batalo! Komence li ŝpatelis per gipso ĉiujn truojn, kiujn li trovis. Tio ne helpis – apude aperis novaj truoj. Tiam mia edzo starigis muskaptilo-kaĝojn kaj glukaptilojn. Matene mi vekiĝis, kaj aŭdis vean pepon de muso, kiu estis kaptita. Mi rigardis kaĝon, en kiu kuregas muso, aŭ rigardis glukaptilon, al kiu algluiĝis du aŭ tri musoj dum unu fojo, kaj preskaŭ ploris. Aleksandro deturninte kapon, ĉar li ne povis rigardi musajn turmentiĝojn, elportis ilin al korto kaj... liberigis.

Post kelkaj tiaj malgajaj tagoj mi diris al edzo:

– Fino! Ni bezonas neniajn glukaptilojn! Mi deziras morton al neniu!

Edzo silentis dum minuto kaj diris:

– Mi ankaŭ ne volas tion! Ĉu vi pensas, ke mi kun plezuro deŝiras musojn de glukaptiloj?

– Kion ni devas fari? Ja kun musoj ni ne povas loĝi. Ĉie estas musa odoro, ĉie estas ekskrementoj: sur planko, en bakujo, eĉ sur tablo! Tio efektive estas infekto!

– Ni havas elembarasiĝon! Ĉu vi memoras, ke mi rakontis, ke mi servis en armeo en tanka kampo? Estis mia vico ricevi en provizejo nutraĵojn por nia plotono. Ĉefserĝento donis al mi du panbrikojn, pesis hordegrion, en alian sakon metis karoton kaj brasikon, fine donis pecon de lardo kaj nemultan viandon. “Ĉu? – mi indignis. – Ja tio estas al plotono por unu fojo!” Sed ĉefserĝento respondis: “Diru “dankon” al virkato, kiun mi akiris, do porcio estus pli malgranda! Kiom nutraĵojn musoj formanĝis kaj difektis! Sed virkato formanĝis duonon da cento de musoj, ceteraj musoj mem diskuris. Tial tia porcio estas ankoraŭ bona

porcio!” Mi scias tiujn musojn! – ridante Aleksandro daŭrigis. – Bonajn nutraĵojn li donis al edzinoj de oficiroj aŭ uzis por *bartero*!

– Kion signifas *bartero*? – mi demandis.

– Tio signifas naturan interŝanĝon. Tio estas interŝanĝo de viando kaj sukero je alkoholaĵo, kiun faris loĝantoj de apuda vilaĝo.

– Mi ne bezonas viajn agrablajn rememorojn! Sed vi parolis pri tio ne hazarde. Ĉu verŝajne vi volis per tiu rakonto diri ion?

– Ĉu vi ne komprenas? Ni devas akiri virkaton, kaj musoj diskuros!

Certe mi ĝoje konsentis. Des pli mi tre amas katojn, ili ĉiam ĉe ni loĝis. Ĝuste al tiu tempo ĉe nia amikino Mirjam katino naskis. Mirjam prenis la katino de strato. Tiu katino mem aliris al Mirjam kaj rigardante ŝiajn okulojn komencis povre sed insiste miaŭi.

Mirjam kliniĝis al la katino.

– Kia vi estas malfeliĉa! – ŝi ekkriis, prenis la katinon je manoj kaj portis ŝin al hejmo. Mirjam kun granda peno lavpurigis ŝin kontraŭ koto kaj mazuto. Estas mirinde, sed katino eltenis ĉion, kvazaŭ ŝi komprenis, ke ŝia savantino faros al ŝi nenion malbonan. Maŝka, kiel oni nomis katinon, rapide alkutimiĝis sur nova loko, kvazaŭ ŝi loĝis ĉi tie dum cent jaroj. Ŝi resaniĝis, pliboniĝis kaj komencis promeni al strato. Tiuj promenoj finiĝis per gravedo. Maŝka naskis kvar ĉarmajn katidojn. Pro unu el ili ni venis al Mirjam. Ĉiuj katidoj estis ĉarmaj, sed unu el ili estis plej bela kaj plej ludema. Koloro de hararo de tiu virkatido estis nigra-blanka, kaj tiuj koloroj estis dividitaj poduone. Dorso estis nigra, sed ventro estis blanka, sur kapo estis nigra ĉapeto, okuloj, kiel ĉe dandino, estis kun maldika nigra linio, sur nazo estis nigra makuleto. Tio makuleto faris lian vizaĝeton tre amuzan, ĉar kutime katoj havas rozkoloran nazon, sed li havis la nigran, kvazaŭ li ŝoviĝis al io kaj malpurigis nazon!

Certe ni prenis tiun katidon.

– Jen li estas mia kristnaska donaco al vi, – ridetante Mirjam diris kaj kun ioma malĝojo donis al ni la katidon.

Estis frosta vintra vespero, edzo kaŝis lin sur brusto. Katido ne rezistis, sed trankvile sidi por li estis enue. Li elŝovis sian vizaĝeton kaj komencis rigardi straton, laŭ kiu ni iris. Proksimiĝis Kristnasko, la plej gaja kaj plej bela festo. Domoj kaj arboj estis dekoritaj per lampetoj, kiuj trembrilis per multkoloraj lumetoj, kreis etoson de io fabela, mirakla. Virkateto kun scivolemo turnis kapon al ĉiuj flankoj, kaj ŝajnis, ke li ankaŭ admiris tiun brilan belecon.

Hejme li ĉirkaŭrigardis kaj iris promeni laŭ tuta loĝejo. En kuirejo li haltis apud forno kaj komencis flari.

– Verŝajne estos utilo! Li flaris musojn... Li estas tia malgranda, sed li jam scias sian aferon! – Aleksandro konstatis. – Kiel ni nomos lin?

– Mi proponas nomi lin Ĉarlik de vorto “ĉarmo”! – pensinte mi diris.

Certe se tio estis en la 4-a de novembro de 2008, do mi nomus lin Obama. Tio estas kompreneble. Ĉu tio estus politike ne takte? Sed kaj la katido kaj la prezidento estas duone nigra kaj duone blanka! Krome ja oni nomas animalojn per homaj nomoj! Ekzemple mi havis belulino-katinon kun nomo Beata honore de pola belulino-kinoaktorino Beata Tiŝkeviĉ. Oni ofte ial nomas kaprojn per Zinka, bovinojn per Manjka, virbovojn per Vasjka[2]. Oj, mi ree rakontas ne pri tio!

Mi revenas al nia nova loĝanto.

Ni faris por Ĉarlik lokon en kuirejo. Li devas alkutimiĝi kapti musojn. Mi ne dormis dum tuta nokto, mi aŭskultis, ĉu virkateto ploras sen panjo? Kelkfoje mi venis al kuirejo, rigardis, kiel li dormas. Sed neniaj plendoj de nova loĝanto estis, kaj ankaŭ tie ne estis la loĝanto, ĉar li estis samtempe ĉie! Li kuregis el ĉambro al ĉambro, al kuirejo kaj al banejo, saltis sur divanon kaj kuris sur lito. Kiam li trankviliĝis kaj bule volviĝis apud miaj piedoj, mi jam estis devigata leviĝi. Kaj poste li malhelpis al ni dormi. En usono, kiel oni scias, kuirejo ne havas pordon kaj ofte lokiĝas en loĝata ĉambro. Tial ni starigis en embrazuro, kiu kondukas al kuirejo, folion de lignolado. Sed kvankam la barilo estis sufiĉe alta, Ĉarlik facile transsaltis ĝin per du aŭ tri salto kaj trafis ĉambron. Ni estis devigata humiliĝi, kaj virkato baldaŭ iĝis pli trankvila kaj dormis pli longe.

Sian nomon li memorfiksis dum unu momento.

Flarinte skatolon kun sablo li tuj rigardis ĝin kiel personan propraĵon.

Kaj komenciĝis ĉe ni gaja vivo! Musoj kvietiĝis. Ne, ili ne malaperis. Kaj ili kvietiĝis dum ne longa tempo. Ili komprenis, ke besto, kiu aperis en hejmo, estas ne timiga. Unue li estas malgranda, kaj tio signifas, ke li estas ne danĝera. Due li ne rimarkis ilin, ĉar li ne havis tempon okupi sin pri iuj gratantaj post muro. Li okupis sin pri esplorado de sia nova loko de loĝado. Sed ni konstante atentis kaj karesis lin, certe se ni havis eblecon.

Kiel ĉiuj katoj Ĉarlik estis tre ludema. Ĝenerale li havis tri ludojn. Unua ludo estas ludo kun sia propra vosto, dum la ludo Ĉatlik transformiĝis en nigra-blanka turbo. Dua ludo estas ludo kun banteto, kiun oni alligis al ŝnuro. Kaj tria ludo estas atako el post angulo al ĉio, kio moviĝas. Antaŭ lia nazo moviĝis gamboj de anoj de familio. Dum tio gamboj, kiuj estis vestitaj per pantalonoj, ne interesis lin. Sed miaj nudaj ĝis genuoj gamboj estis lia ŝatata objekto de ĉaso. Rezulte miaj povraj gamboj kovriĝis per sangaj gratoĵoj, kaj kiam mi foje vizitis okliston, li ne proponis al mi sidi sur apogseĝon por esplorado de miaj okuloj. Li kun teruro rigardis miajn gratitajn laŭlonge kaj laŭlarĝe gamboj.

– Ĉu tio estas hejma torturo? – li demandis kaj montris gratoĵojn per fingro.

Mi nege kapoklinis.

– Ĉu tio estas seksa torturo? – elorbitiginte okulojn li flustre diris.

Mi devas diri, ke en Usono hejmajn krimojn – batado de edzo aŭ edzino – oni rigardas kiel sufiĉe seriozan krimojn. Oni povas malliberigi tiun krimulon dum granda kvanto da jaroj. Sed seksa perforto estas pli serioze. Ŝtato defendas ofenditan virinon, en ĉiu oficejo estas afiŝo kun numero de telefono, kien oni povas telefoni, se io okazis... Pro tio estas unu bona momento: per edzo aŭ per konkubo tre ofendita virino povas ricevi preskaŭ senpagan loĝejon. Tion uzas aborigenoj, precipe ardaj hispanlingvanoj, por kiu tranĉilo aŭ pistolo estas kutimaj dum kverelo. Jen ruzaj personoj interkonsentas: mi kvazaŭ batos vin kaj tiel plu, kaj vi ricevos loĝejon, sed poste ni paciĝos! Nu jen, mi ree rakontas pri ne ĉefa temo!

Mi revenas reen, dume mi ne forgesis pri kio mi rakontas. Mi trankviligis la kuracisto, klarigis, ke tio ekstravagancoj de mia katido. Kuracisto pro miro alte levis brovojn kaj komencis pririgardi miajn okulojn. Mi pensis: “Bedaŭrinde leĝo ne konsideras katan torturon, tiam mi certe ricevus loĝejon! Tio estas ŝerco, bedaŭrinde,” – mi ekspiris.

Kiajn amuzojn faris nia ĉarma ulo! Virkateto ne limiĝis pri kutimaj amuzoj, li mem elpensis la novaj. Ĉu vi ne kredas? Jen aŭskultu. Unua huliganaĵo, kiun li kun plezuro faris, estas disvolvado de rulo de higiena papero! Mi kelkfoje vidis, kiel starante per malantaŭaj gamboj Ĉarlik rapide movis antaŭajn gambojn, kaj disŝirita papero falis apud liaj gamboj. Post kelkaj instruoj Ĉarlik komprenis, ke ni estas ne milionuloj kaj ne bezonas neatenditajn elspezojn. Kaj li ĉesis fiagi. Kaj sen tio li havis multajn okupojn. Kiam mi sternis littukon sur divano, li saltis, rampis sub ĝi kaj haltis. Li atendis. Tio estis unua sceno. Duan scenon mi elpensis. Ĉifinte littukon kiel sakon mi levis ĝin, kaj li trafis sur ĝia fundo. Mi komencis turni tiun sakon pli rapide kaj pli rapide. Alia kato krius pro timego. Sed Ĉarlik ne kriis. Tia karuselo plaĉis al li. Li sidis silente kaj verŝajne ĝuis. Plu. Ni havis seĝo kun turniĝanta sidloko. Virkateto post ekkuro saltis sur ĝin, sidloko komencis turniĝi, kaj li postuleme rigardis min atendante pluajn miajn agojn. Mi turnis sidlokon, kaj virkato levante voston kun ĝojo turniĝis sur ĝi. Tiun ĝojon mi klare vidis sur lia vizaĝeto! Poste li elpensis veturi per mia pantoflo. Mi havis tiajn orajn pantoflojn faritajn en Ĉinio. Kiu krom ĉinoj povus fari orajn pantoflojn kiel orajn ŝuojn por balo? Ho, tiuj ĉinioj estas ĉie prosperaj kaj sukcesaj! Ili faras ĉion! Ili faras aŭtojn, elektronikojn, diversan vazaron, ludiloj por infanoj, memoraĵojn por ĉiu evento de vivo en grandega kvanto! Sed ili komencis de manteloj kaj bluaj kostumoj. Tamen ili rapide prosperis! Ili vendas siajn varojn en tuta mondo! Usono delonge kapitulacis kaj jam ne kontraŭstaras, usona popolo edukiĝas kun porcelanaj anĝeletoj kun flugiloj faritaj el punto.

Jen, mi komencis rakonti pri oraj pantofloj sed nun rezonas pri Ĉinio! Mi revenas al pantofloj. Nia planko estas kovrita per *karpeto. Karpeto* estas tia

tapiŝa unukolora kovraĵo, vera polvokolektilo. Ĉiuj usonanoj tre ŝatas karpeton, ili ĉie metas ĝin – en dormejoj la luman sed en aliaj ĉambroj la pli malluman, ne tian malpuriĝeblan. Sed tutegale karpeto baldaŭ kovriĝis per malpuraj makuloj. Mi ree parolas ne pri ĉefa temo! Ĉarlik ekkuris kaj saltis en pantoflon kaj glitis sur karpeto kiel skio sur neĝo! Kio li ankaŭ faris? Li ial malŝatis florojn. Se sur tablo staris bukedon, matene ni trovis ĝin sen kapetoj de floroj. Nia ĉarma virkateto artifike fortranĉis kapetoj de floroj. Sur tablo kuŝis kapetoj de asteroj, de rozoj, de diantoj, sed el vazo povre elstaris trunketoj. Starigi bukedon pli supren estis senutile, li atingis ĝin ĉie – en ŝranko, en bretoj. Foje antaŭ Nova jaro mi aĉetis Kristnaskan floron. En Rusio oni nomas ĝin kiel Decembriston, ĉar ĝia florado komenciĝas en decembro. Tia ĉarma floro el speco de herbaj kaktoj. Ĝiaj floroj, kiuj similas sonoriletoj, kreskas unu el la alia, la floroj havas diversajn kolorojn kaj tonojn – de la blanka kaj la



Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

rozkolora ĝis la ruĝa. Kial mi priskribas belecon de tiuj floroj? Por ke vi komprenu, kiel ni kompatus tiujn florojn, se la huligano mortigus la miraklon. Ni pendigis poton kun la floro sub plafono. Matene sur planko kuŝis viktimoj de nia flormurdisto. Verŝajne Ĉarlik grimpis sur supran breton kaj atingis floron. Por tio li estis devigata tre multe plilongiĝi, sed li, kiel ni ekvidis, sukcese faris tiun fiagon. Ni ĉesis aĉeti florojn.

Ankaŭ Ĉarlik tre ŝatis spekti televidilon. Sed li ŝatis spekti ne ĉiujn spektaĵojn. Kutime li spektis spektaĵojn pri animaloj. Kutime li kuŝas sur lanuga karpeto antaŭ televidilo kaj observas per maldiligenta rigardo diversajn bestojn, kiuj loĝas en tiu skatolo, sed kiuj estis ne materialaj. Komence li provis tuŝi per gambeto ekranon penante kapti almenaŭ iun, sed konvinkiĝinte ke tio estas neeble, li limiĝis pri simpla observo... Sed kiam de ekrano aŭdiĝis sonoj de pafado kaj eksplodoj, li leviĝis kaj foriris plenigita per malestimo al maldecaj homaj okupoj. Lin ne interesis mortigoj, ŝteloj kaj fiaferoj.

Sed tamen kial nia Ĉarlik ricevis duan nomon Ĉingaĉguk[3] Akra Ungego? Nun mi klarigos. Virkateto kreskis rapide, liaj ungetoj kreskis kaj fortiĝis. Sed dume li ne atentis musojn, daŭrigis ĉasi nudajn gambojn de ajna homo, kiu venis al nia hejmo. Tamen li atentis enflugintajn muŝojn. Bedaŭrinde al ni alflugis muŝoj. Nia usona najbarino kulpas pri apero de tiuj muŝoj. Ŝia nomo estis Fren, ŝi estis amantino de katoj, patronino de katoj, ĉar tre kompatis kaj amis ilin. Ŝi neniam havis edzon, ŝi dediĉis sian vivon nur al katoj. Ŝi havis amikinojn nur laŭ kata temo. Se ŝi sukcesis doni rifuĝon al senhejma kato, ŝi loĝigis ĝin en sia loĝejo, poste vizitis kun ĝi veterinaron, kie oni steriligis katon, kaj poste ŝi lokis ĝin al siaj amikoj aŭ konatoj. Iufoje kvanto de katoj en ŝia loĝejo estis du dekoj!

En Nov-Jorko estas tre multaj sovaĝaj agresaj katoj, kiujn oni ne povas nek preni je manoj nek malsovaĝigi. Bonkoraj homoj nutras tiujn katojn, des pli konservaĵoj por katoj kaj hundoj estas tre malmultekostaj. Same faris nia Fren. Li lokis trogon, al kiu alkuris ĉiuj katoj el apudaj kortoj. Restaĵojn de nutro manĝis formikoj kaj certe muŝoj. Tio estis bonega medio por reproduktiĝo. Ĉar la trogo staris sub nia fenestro, do tiuj “lokomotivoj” (grandaj muŝoj) kun impertinenta zumo enflugis al malfermita fenestro. Kaj ĉi tie ilin atendis danĝera ĉasisto. Li pacience sidis en embuskejo, kaj kiam enflugis vica muŝo kun dimensio de granda abelo, Ĉarlik rapide elsaltis el embuskejo kaj – malamiko ne venos! – saltis al grandega alteco kaj lerte kaptis sian viktimon. Ĉasante muŝojn Ĉarlik havis geparda rapido!

– Rigardu, li estas natura ĉasisto, li neniom maltrafis! – foje mi diris al edzo.

Sed foje okazis tio. Aleksandro kuŝis sur divano

kun libro kaj ekdormis. Libro falis al lia brusto, sed edzo daŭrigis trankvile dormi. Se li ne dormus kaj se libro kovrus lia vizaĝo, do ĉio estus bone... Sed en tiu okazo kvazaŭ spite super lia kapo flugis muŝo. Certe Ĉarlik estis atentema. Li kuregis laŭ Aleksandra korpo kaj saltis supren de vizaĝo! Mi ekvidis, kiel edzo salte leviĝas, komprenas nenion, sed laŭ lia vizaĝo sango strie fluas.

– Jen kion li faras! Li estas kiel Ĉingaĉguk Akra Ungego! Li estas ĉasisto, indiano! Diablo prenu!

Ĉarlik gratis lian mentonon, nazon kaj frunton! Dum mi kuracis per superoksido sangaj vundoj sur vizaĝo de edzo, li tra ĝemoj admire diris: “Li estas vera Ĉingaĉguk Akcipitra Ungego!” Imagu, Aleksandro ne ekkoleris pro kato kaj ne ofendiĝis, tiel forte li amis la katon! Kaj Ĉarlik estis tre sindona al li.

Lasta fiago de la kato estis plej serioza kaj danĝera. Proksimiĝis Nova jaro, kaj ni decidis kiel ĉiam starigi abion. Ni aĉetis artefaritan abion, des pli ĉi tie artefaritaj abioj ne diferencas de la naturaj. Por tiu abio oni vendas sprajon kun odoro de pinglo, oni povas ŝpruci kaj imagi, ke oni trafis al natura abia arbaro! Intercetere mi estas granda kontraŭulo de elhako de vivaj abioj, eĉ se oni kulturas ilin speciale por ĝojo de infanoj kaj plenaĝuloj. Ili kreskas dum dek jaroj por esti dehakitaj kaj vivi en duonviva stato dum ankoraŭ dek tagoj... Kaj poste oni elportas ilin al rubujo. Kaj ili kuŝas kaj mortas sur malpura neĝo brilante per restaĵoj de oraj kaj arĝentaj fadenoj. Per homoj mortigita beleco... Ne, mi kategorie kontraŭas elhakon de abioj! Aĉetu la artefaritaj, ili estas ne malbonaj ol la naturaj kaj ne turmentos vian konsciencon... Oj, mi ree rezonas pri problemo, kiu estas ne en temo de la rakonto.

Nu jen. Ni pendigis sur abio multkolorajn globetojn. Tiajn diversajn abiajn ludilojn, kiujn mi havis en infaneco, mi en vendejoj ne trovis. Estas nur globetoj. Ne estas neĝulinoj, dometoj, leporoj, papagoj. Sed estas multaj diversaj oraj, arĝentaj kaj multkoloraj girlandoj. Plej grave estas multo de variantoj de multkoloraj lampetoj. Ni pendigis abiajn ludilojn komencinte de supre, por ke Ĉarlik ne malhelpu. Li jam longe observis niajn agojn per brilaj okuloj, kaj pinto de lia vosto maltrankvile tremis kiel antaŭ salto. Mi ne havis stativon, kaj ni starigis abion en sitelon kun sablo. Ni pensis, ke se kato saltos sur abion, do ĝi ne falos. Sed ni eraris. Ni eliris el ĉambro, kie staris nia brilanta abio per lumetoj kaj globetoj, kaj tuj malantaŭe aŭdiĝis obtuza bruo. Enkurinte al ĉambro ni ekvidis sur planko kuŝantaj abio, kiu daŭrigis pulsi per lampetoj. Nun tio similis signalon “SOS!”, kiam ie okazas akcidento, ekzemple en atoma elektrejo, do instrumentoj sur paneloj pulsas klarigante al homoj – vi devas saviĝi! Sed ni feliĉe ne devis saviĝi, eĉ ne estis incendio, sed povus okazi fuŝkontakto... Ni pene levis abion, kolektis splitojn de globetoj kaj longe polvosuĉis diablan karpeton, el kiu eligi malgrandajn vitrajn splitojn estas ne facile. Ĉarlik aperis nur en sekva mateno...

Sed kun musoj ni ne havis feliĉon. Kiam Ĉarlik elkreskis, li ĉasis ilin tre sukcese. Sed pro tiu ĉaso kvanto de musoj ne malpligrandiĝis, ĉar li kaptis ilin nur por ludi kun ili. Ĉarlik estis ne sangavida kaj kaptinte muson ludis kun ĝi, ĝis kiam ĝi forkuris. Mi mem vidis, kiel li batinte muson je pugo, kiel futbalisto batas pilkon, donis al ĝi akcelon, kaj la muso forkuris... Ni kapitulacis! Musoj venkis, ni estis devigata elloĝiĝi de tiu loĝejo. Ni transloĝiĝis al bonega distrikto, kie ne estis vendejoj, kaj sekve ne estis musoj. Verŝajne...

notoj:

1. Wald Disney – fama usona artisto kaj reĝisoro de animaciaj filmoj.

2. Zinka, Manjka, Vasjka – ĵargonaj formoj de rusaj nomoj Zinaida, Marija, Vasilij.

3. Ĉingaĉguk – indiano, heroo de libroj de fama usona verkisto James Fenimore Cooper.

Esperantigis

Igorj Ĥomjakov

(Rusio)

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_

Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Ĉiujn kontribuaĵojn al la ĉefredaktoro.
Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_